




ORIENTA STELO

MARTO 2017



Orienta Esperantista Federacio
Originale fondita en aprilo 1932

Eastern Esperanto Federation
Originally founded in April 1932

Komitato - Kontaktdetaloj

Roy Simmons
Barrie Murphy
Mark Drake
Roy Threadgold

Sekretario 01473461346
Kasisto 01702472193
Komitatano 02085188094
Bultenisto 01371850481

rokeby@globalnet.co.uk
celiaandbarrie@tiscali.co.uk
marko.drejko@gmail.com
roy@boydellsdairy.co.uk

Tiuj kiuj ricevas OS rete, ricevas ĝin pli frue kun koloraj bildoj, kaj samtempe la Federacio ŝparas la poŝtkoston. Ĉiuj gajnas! Nur bezoniĝas informi al Roy T. pri via retadreso.

.....

Aŭtuna Renkontiĝo en Maldono



Anna dum ŝia prelego

En septembro 2016 Kimie Markarian telefonis al nia sekretario kun la propono, ke li invitu Anna Löwenstein prelegi ĉe nia aŭtuna kunveno en la Kvakera Domo, Maldon en oktobro. Tion la sekretario faris, kaj Anna konsentis. Anna proponis kelkajn temojn, kaj ni elektis la prelegon pri praaĵ Keltoj.

Renato Corsetti, la edzo de Anna akompanis ŝin. Ili partoprenis la tutan programon, kiu inkluzivis, antaŭ lunĉo, lingva kliniko organizita de Barrie Murphy kaj promeno tra la urbo ĝis la estuaro de la rivero Blackwater, kie la saksoj estis venkitaj dum la Batalo de Maldon.

Post lunĉo estis kvizo, la prelego de Anna, kiu estis tre interesa, kaj la ludo 'Skramblo.' Estis bona etoso dum la kunveno, kiu finiĝis je la kvina, kaj la manĝoj, kiel kutime estis bonaj. Ni estis bonŝancaj ankaŭ ĉar la vetero estis suna.

La problemo, tamen, estis ke la tuta ĉeestantaro nombris nur sep, inkluzive de Anna kaj Renato. Mark venis de Londono, Kimie kaj Arturo Prent de Brentwood, Barrie de Leigh-on-Sea, kaj Roy Simmons de Ipswich. Roy Threadgold kaj David kaj Anne Harvey de Braintree nepovis partopreni, nek Brian Bishop de Leigh-on-Sea. Kvankam estis bonege ne aŭdi la anglan dum la tago, estis iomete embarase, ke ni estis tiom malmulte.

Ŝajnas, ke la fonto de nia ĉeestantaro nombras nur sep Esperantistojn, kaj du, kiuj devas uzi la anglan. Tio vere signifas, ke **ni devas diskuti la estonteco de la federacio dum la jarkunveno en Braintree en marto**. La kosto de la ludo de la ejo en Maldon ankaŭ altiĝis kvindekprocente dum la lasta jaro, ĝis £60. Tio vere estas tro por grupo, kiu pages nur £25 kiel tagmono.

JARKUNVENO
St Michael's Church House, Braintree
Sabaton la 25an de marto 2017.

11.00 - Lingva Klinikio

12.00 - Promeno

1.00 - Lunĉo

2.00 – Jarkunveno - dum kiu ni diskutos ĉu la federacio ankoraŭ havas vivkapablon.

2.30 - Kvizo

3.00 'Strangaj Objektoj' – Alportu nekutiman objekton kaj parolu pri ĝi dum tri-kvin minutoj.

Bring an unusual object and talk about it for 3-5 minutes

4.00 - Temanĝo kaj lingva defio, kaj ludo se estos tempo

5.00 - Adiaŭoj

Tagmono - £5 - Day money

Apenaŭ necesas diri ke la fervojo ne funkcios tiun tagon. Estos neniu trejno inter Liverpool Street kaj Ingatstone – nepros veturi aŭtobuse, aŭte, piede, bicikle aŭ ĉevale!


Legu viajn leterojn zorge

>”Panjo, mi ĵus ricevis leteron de Roberto; li petas mian manon. Ĉu vi permesos ke mi akceptu?”

>“Roberto! Ho mia naivulino, ĉu vi vere ne komprenas la dezirojn de Roberto?”

>“ Legu do mem, Panjo, kion li skribas” – *‘Fraŭlino, donacu al mi vian manon. Mi povas vivi nur por vi. Per floroj kaj baloj mi plenigos vian tutan vivon. Kun via kiso mi iros al la fino de la mondo’.*

>Ha, vi tute ne bone legis la leteron. Rigardu kion li skribis: *“Fraŭlino, donacu al mi vian monon. Mi povas vivi nur per vi. Per ploroj kaj batoj mi plenigos vian tutan vivon. Kun via kaso mi iros al la fino de la mondo”.*



agnoske al Daily Mail